

AMI LA ALIULOJN KAJ SIN DONI

Artikolo aperinta en la revuo NIGRIZIA N° 6 en junio 2011

Kun Jesuo, "Dio kun ni" ŝanĝiĝas la vojirado de la homoj. Antaŭ la Kristo, la homaro estis orientita al la Sinjoro en senĉesa serĉo de agordo kun iu Dio kiun la Religio prezentis kiel ĉiam pli malproksima, postulema diaĵo, kiu trovis malperfektaĵojn eĉ en la sanktuloj kaj en la anĝeloj kreitaj de Li mem ("Vidu, al Siaj servantoj Li ne konfidis, Kaj Siajn anĝelojn Li trovas mallaŭdindaj" (Ijob 4,18))

Direktitaj al ilia Dio, ĉio kion faris la homoj estis por la Sinjoro, ekde la servado dum la preĝoj, ĝis la amo por la aliulo. Kaj la plej piaj homoj ofte estis tiom sin dediĉintaj al ilia Dio ke ili ne ekkonsciis pri la bezonoj de la proksimulo.

Kun Jesuo ĉio ŝanĝiĝas.

Kun Li finiĝas la serĉado de Dio: oni ne plu devas serĉi la Sinjoron, sed oni devas Lin akcepti kaj, kun Li kaj kiel Li aliri la homojn. Ili, fakte, ne plu vivas por Dio, sed el Dio, Patro kiu petas esti akceptata por kuniĝi kun ili, por plivastigi ilian amkapablon kaj fari el ili la ununuran sanktejon de kie radii la amon al ĉiu kreitaĵo.

Dio fariĝis por ĉiam homo, kaj estas kun homo ke la kredantoj devas alfronti unu la alian. Por Jesuo kio kaŭzas la sukceson aŭ la malsukceson de la homa ekzistado, ĝin igante, tiamaniere. Definitiva, ne estas la rilato kiun oni havis al Dio, sed al la homoj. Ne estas Lin rekoni kiel "Sinjoro, Sinjoro", sed plenumi la volon de la Patro (Mt. 7, 21), akceptante lian amon kaj ĝin transformante en agojn kiuj komunikas vivon.

Pro tio en la listo de la kondutoj kiuj, laŭ Jesuo, malpurigas la homon, neniu el ili koncernas la rilaton kun la diaĵo, la dikul-ton, la religion, sed en ĝi estas enlistigitaj la nocaj kondutoj, kiuj endanĝerigas la aliulon: "hommortigoj, adultoj, prostiduaĵoj, ŝteloj, falsaj atestoj, kalumnioj" (Mt.15, 19). Sammaniere, al riĉulo kiu pridemandis Lin kiujn ordonojn li devis obei por atingi la eternan vivon, Jesuo citas nur tiujn rilatantajn la devojn al la proksimulo kaj ne tiujn, kiujn oni taksis gravegaj, pri la devoj al Dio: "Ne mortigu; Ne adultu; Ne ŝtelu; Ne parolu malveran ateston; Respektu vian patron kaj vian patrinon; kaj: Amu vian proksimulon kiel vin mem." (Mt. 19,18-19).

La mesaĝo de Jesuo, sekve, fariĝas universala kaj koncernas la tutan homaron. Oni ne pridemandos la homojn ĉu ili kredis, sed ĉu ili amis; oni ne pridemandos ilin ĉu ili supreniris al la templo, sed ĉu ili malfermis sian domon al bezonulo, ne, ĉu ili oferdonis ion al la Sinjoro, sed ĉu ili kundividis sian panon kun tiuj kiuj tion bezonis. Kiu ajn elmontras atenton al la bezonoj de la aliulo kaj intervenas por lin helpi, tiu eniros la eternan vivon.

Jesuo eldiras ĉion tion en parabolo, kiu troviĝas nur en la Evangelio laŭ Sankta Mateo (Mt. 25, 31- 46). Jesuo aludas bone konatan bildon, tiun pri la juĝo de la paganaj landoj: "En la transmondo, la Sanktulo, ke li estu benata, prenos rulaĵon de la Torao, ĝin li metos sur siajn genuojn kaj li diros : kiu okupiĝis pri tiu. Li venu ĉi tien kaj li ricevos sian rekompencan" (Aboda Z. 2 a,b).

Laŭ la tiutempaj kredoj, en la tago de la lasta juĝo, Dio estus konsultinta la libron en kiu Li skrupule estis markinta ĉiujn agojn faritajn de la homoj, ilin disdividante en bonajn kaj malbonajn, kaj laŭ tiuj Li estis juĝanta ilin.

Jesuo ne bezonas iun ajn libron.

Kiel la paŝtisto facile disdividas la ŝafojn disde la kaproj, tiel la Sinjoro tuj distingas tiun kiu amis kaj tiun kiu ne amis. Kiel la fiŝkaptisto scias apartigi la bonajn fiŝojn de la putraj (Mt. 13, 48-49) kaj la kamparano rekonas la bonajn fruktojn kaj tiujn putrajn (Mt. 7,17-19), la Sinjoro tuj konas tiun kiu havas vivon kaj tiun kiu ĝin ne havas.

Kiu orientis sian vivon al la bono de la aliuloj, kaj foruzis sian tutan vivon por la bono de siaj similuloj, oni tiun facile rekonas. La agoj faritaj dum la tuta vivo, fakte, stampiĝas en la homo, lin signas por ĉiam, en la bono samkiel en la malbono.

Jesuo proklamas "benataj" la justulojn kiuj donis al Li manĝi kiam Li malsatis, kiuj donis al Li trinki kiam Li sojfis, kiuj Lin akceptis kiam Li estis fremdulo, kiuj vestis Lin kiam Li estis nuda, kiuj vizitis Lin kiam Li malsanis kaj prizorgis Lin kiam Li estis en malliberejo (Mt. 25, 35-36).

Tiuj ĉi ne faris spektaklajn agojn, sed ili faris agojn eblajn al ĉiuj, kiujn ĉiu povas fari, agojn je helpo kaj je mizerikordo al la plej bezonantaj kaj flankenpuŝitaj homoj en la medio, al kiuj la Sinjoro sin identigas.

Jesuo difinas "justuloj" tiujn kiuj dum ilia tuta vivo ĉiam estis pretaj helpi, mildigi la suferojn, kundividi la penojn, sin ŝarĝi per la alies pezaĵoj, kaj Li malkaŝas ke la agoj de ili faritaj al la anonimaj bezonuloj, vere, estis adresitaj al sia persono mem, vekante miron: "Sinjoro, kiam ni vin vidis malsata, kaj vin satigis?..." (Mt. 25,38).

La miro de la justuloj montras ke tiuj ĉi ne amis por akiri al si meritojn, kaj eĉ malpli ĉar en la aliulo ili ekvidis la Sinjoron (kiun ili ne konis), sed ili amis ofereme kaj malegoisme. La bezonulo estis helpata de ili kiel tia, kaj ne pro iu supozita ĉeesto en li de io dia. Pro tio ili eniras la plenan de la vivo: la vivo kiun oni donacas estas tiu kiun oni havas.

Tiu kiu, male, estas fermita al bezonulo, kiu koncentriĝas nur al siaj bezonoj kaj ne vidas tiujn de la aliuloj, tiu estas iu kiu pereigas sian propran ekzistadon. Lia vivkapablo estas atrofiita de egoismo kiu kreskigas nur sin mem kaj fermas la homon en mortotukon.

Dio donacas vivon al tiu kiu transdonas vivon, sed kiu ne sin oferdonas, kiu nenion donacas al aliulo, tiu sin retrovos ne nur ne plu ion havi, sed esti neniu plu. Li iros renkonte al tuta ruiniĝo, neevitebla

sekvo por tiu kiu, senigante je vivo la aliulojn, sin flankenpuŝas de la vivo.

Jen kial Jesuo nun uzas gravajn vortojn por tiuj kiuj ne donis al Li manĝi kaj trinki, Lin ne akceptis nek kuracis, Lin ne vizitis nek gastigis: "For de mi, vi malbenitaj..." (Mt. 25,41). Jesuo uzas la teruran atakparolon, malbenitaj, kiu revokas Kainon, la fratmortiganton, la unuan murdiston en la Biblio ("Kaj nun estu malbenita", Gen. 4,11).

La malbeno ne devenas el Dio.

La Patro ne malbenas, sed Li benas ("vi benataj de mia Patro", Mt. 25,34). Estas la homoj kiuj sin malbenis, ĉar per iliaj egoismaj elektoj ili sin fermis al la vivo. Ili estas malbenitaj ĉar ili neis la helpon al tiu kiu bezonis ĝin, kaj ilia rifuzo por Jesuo egalas al mortigo: "Mi malsatis kaj vi ne donis al mi manĝi" (Mt. 25,42).

Alberto Maggi